



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

N-ro 12/1976 - 18 marto 1976  
Aperas ĉiusemajne

Ne timu "kosman katastrofon"!

Skribu

aŭskultu kaj  
skribu

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pöckel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

al la Esperanto-Radiostacioj!

Ĝenerala Kongreso Honora Komitato - Programo

Eindhoven (pp) - Krom la jam cititaj politikistoj deklaris sin pretaj aliĝi al la honora komitato de la kongreso

Walter Behrendt, FRG, Membro de la Germana Federacia Parlamento kaj Vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento

Magistro K. van Ryckevorsel, Nederlando, Membro de la Stata Konsilantaro de Nederlando

### Kongresa Programo

#### Vendrede, 16.4.76

19,00 horo Film prezentado - Verda Salono  
20,00 - 23,00 horo Interkona Vespero - Babilejo  
Kantas "Strijps Meisjeskoor"

#### Sabate, 17.4.76

10,45 - 12,45 horo Jarkunveno LEEN - Salono Mulier  
10,00 - 12,30 horo Jarkunveno GEA - Salono Helikon  
11,00 - 12,30 horo Ĝenerala Kunsido BEF - Verda Salono  
"Kiel ideale propagandi - varbadi"  
10,00 - 12,00 horo Esperanto-Programita - Salono Triangel A  
13,00 - 13,45 horo Lunĉo - Restoracio  
14,00 - 15,00 horo Oficiala Malfermo - Teatra Salono  
15,00 - 16,30 horo Oficiala Akcepto fare de la urbestro - Babilejo  
16,00 - 17,00 horo Jarkunveno LEEN - Salono Mulier  
17,00 - 18,00 horo Film prezentado - Teatra Salono  
18,00 - 19,00 horo Tagmanĝo - Restoracio  
19,00 - 20,00 horo Ekumena Diservo - Salono Helikon  
Kantas "Strijps Meisjeskoor" en Esperanto  
sub gvido de s-ro L. de Vries  
20,00 horo Balo - Babilejo kaj ĉirkaŭaj ejoj  
Muzikas: orkestro de Henk van Zandvoort

#### Dimanĉe, 18.4.76

9,00 - 10,30 horo Fakaj kunvenoj GEA - Salonoj "Muzoj", Triangel B+C  
10,00 - 12,00 horo Esperanto Programita - Salono Triangel A  
10,00 - 10,45 horo Prelego de d-ro H. Tonkin, prezidanto de UEA  
"Niaj plej gravaj taskoj en UEA" - Teatra Salono  
11,00 - 12,00 horo Larĝkranaj perdiapozitivaj prelego de Torben kaj  
Elisa Kehlet pri la Brazila Esperanto-Kooperativo  
"Bona Espero" - Teatra Salono  
10,00 - 12,00 horo Eŭropa Esperanto Centro - Salono "De Jong"  
12,30 - 13,30 horo Lunĉo - Restoracio  
14,00 - 15,30 horo Tri diversaj laborkunsidoj  
D-ro W. Bormann - Ekonomiaj aspektoj de la  
lingva diverseco - Verda Salono  
H. Behrmann - Instruado de lingvoj - Salono Heliko.  
Ing. Hans Bakker, filo - La sekvoj de lingva  
superregado - Salono Mulier

Kongresa programo

15,30 - 16,30 horo Trilanda Renkontiĝo - Salono "De Jong"  
16,30 - 17,30 horo Generala kunsido - Teatra Salono  
18,00 - 19,00 horo Tagmanĝo - Restoracio  
20,15 horo Festvespero - Teatra Salono

Lunde, 19.4.76

9,00 - 12,30 horo Ekskurso kun folklora surprizo  
13,00 - 14,00 horo Komuna brabantia panmanĝo kaj adiaŭo - Restoracio

Kongresejo: Philips' Kultura Centro, Mathildelaan, Eindhoven

Kongresa adreso: Eŭropa Esperanto Kongreso, Floraplein 23,  
Eindhoven, Nederlando, Tel. (040) 11 41 62

\*\*\*\*\*

Unua Esperanto-vortaro makedona

Prilep (pp/mĝ) - Makedonia Esperanto-Ligo Prilep (P.f. 35, Jugoslavio) enprogramigis en sian eldonplanon ĉi-jaran eldonon de Esperanto-makedona kaj makedona-Esperanta vortaro kun konciza gramatiko en unu volumo. La manuskripton de la unua parto pretigas Metodi Galeski el Prilep, kaj la duan Ĝorĝi Pop-Atanasov el Skopje. La vortaro aperos antaŭ la 20-a Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj, okazonta en Prilep de la 28-a ĝis 30-a de julio 1976. Ĝi estos la unua Esperanto-Kongreso sur teritorio de Makedonio, kaj la vortaro estos la unua presita Esperanto-libro en PR Makedonio. Pro tio regas granda intereso por la vortaro en Madedonio, kie la Esperanto-movado pli-vigligas dum la lasta tempo.

La lingvoj de la Eŭropa Universitato en Firenze

Schoorl (pp) - Eŭropa Esperanto Centro informas:

En la nederlanda gazeto "Nieuw Europa" n-ro 1/1976 oni povas legi (en traduko):

La kontrakto deklaras ke la oficialaj lingvoj de la instituto estu: dana, germana, angla, franca, itala kaj nederlanda. Ĉiu profesoro kaj studento devas scii almenaŭ du el tiuj lingvoj. Por ĉiu akademia aktivaĵo oni elektos el ĉi tiu listo du laborlingvojn, konsiderante la lingvoscion kaj la dezirojn de la profesoroj kaj studentoj. La praktiko devos lerni kiel realigi ĉi-tiun maleblan formulon.

Verŝajne oni plej multe uzos la francan kaj la anglan.

Ne partoprenos multaj studentoj kiuj ne regas pli-malpli tiujn lingvojn. Danoj kaj nederlandanoj kiuj konas nur la germanan kiel duan lingvon preskaŭ ne plu ekzistas kaj por praktikaj kaŭzoj oni devas malakcepti ilin.

IFEFF-Kongreso en Skelleftea

Skelleftea (pp) - La 28-a Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantaj Fervojistoj (IFEFF) okazos inter la 12-a kaj 18-a de junio 1976 en la sveda urbo Skelleftea.

Selleftea situas sur la marbordo de la Botnika Golfo je la etendaĵoj de la montaro. La distanco de Stockholmo al Skelleftea estas 850 km. LKK esploras diversajn vojaĝeblecojn, ekz. per speciala vagono ekde Malmö al Kopenhago. Ekzistas ankaŭ regula aerlinio de Stockholmo al Skelleftea. La enlokaj prezoj laŭ informo de LKK ne estas altaj.



### Internacia Foiro de Barcelono

Barcelono (pp) - La Internacia Foiro de Barcelono, Hispanujo, same kiel en la lastaj 17 jaroj, sinsekvaj, ankaŭ ĉi-jare eldonis la oficialan afiŝon pri la Foiro en la Internacia Lingvo.

Krome estos la 10-a jaro, ke la Direkcio de la Foiro disponigas al la Hispana Esperanto-Instituto standon kiel informojn pri la Internacia Lingvo.

### Ankaŭ Milana Foiro kun Esperanto

Milano (pp) - La Ĝenerala Specimenfoiro de Milano de la 14-a ĝis la 23-a de aprilo 1976 denove eldonis afiŝon en Esperanto.

Sur la afiŝo oni povas legi: Milano "La Granda Foiro. Ĝenerala Specimenfoiro 14-23 Aprilo 1976. 54 fakaj ekspozicioj Majo 1975 - Aprilo 1976.

\*\*\*\*\*

### Lasta adiaŭo

Budapeŝto (pp) - Laŭ informo de Hungara Esperanto-Asocio lasta adiaŭo de la mortinta Kolomano Kalocsay okazos en Mária-besenyő apud Gödöllő, la 25-an de marto 1976, je la 14-a horo.

Kiel ni krome eksciis, en la tutlanda nacia gazetaro de Hungario aperis informo pri la morto de d-ro K. Kalocsay.

### Esperanto-Centrum

Pli kaj pli ofte formiĝas Esperanto-Centroj kiel agad-bazoj. Ankaŭ en Den Haag, Nederlando, ekstis tia centro sub la nomo "Esperanto Centrum Nederland", al kiu apartenas kvar nederlandaj Esperanto-organizaĵoj.

Tiu Esperanto-Centrum eldonis afiŝon kaj varbilon kun la slogano "esperanto 2e taal voor iedereen".

Prezoj: Afiŝo grandformata (60 x 43 cm) 1 ekz. -,50 n.gld.  
Afiŝo formata 43 x 30 cm 1 ekz. -,30 n.gld.  
Flugfolioj 100 ekz. 7,-- n.gld.  
Sendokostoj: por ĉiu kvanto de 10 afiŝoj aŭ malpli 1,- n.gld.  
por ĉiu kvanto de 50 flugfolioj 1,- n.gld.

Adreso: Esperanto-Centrum Nederland, riouwstraat 172, Den Haag 2011

El akompana cirkulero ni citas:

"Karaj gesamideanoj, tre serioze ni petas vian atenton pri la jeno: la tuta esperanto-movado en Nederlando nombras malpli ol 2000 anojn. Se ni ne volas pereji, nepre necesas ke ni formu UNU FRONTON kontraŭ la malfacilaĵoj.

En Hago ni jam spertis profiton dum nia propagando kiel Centrum. Ĉi-vintre okazis 3 konversaciaj kursoj, okazas elementa kurso kaj baldaŭ denove okazos kaj elementa kaj konversacia kursoj... Ni ankoraŭ havas perspektivojn. koncerne la savon de nia movado la parolo estas al VI!"

\*\*\*\*\*

Pilo-Press - Internacia Informservo, aperas ĉiusemajne, jarabono 30,-GM  
Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto  
Nürnberg 819 56-851

## Esperanto en Radio

Svisa Kurtonda Servo. La lasttempaj elsendoj el Berno supozigas, ke tiuj Esperanto-elsendoj fariĝis lingvo-scienca forumo. D-ro Arthur Baur denove prelegis pri la reto-romana lingvo, kaj ges-roj Gacond daŭrigis sian serion pri Esperanto-instruado.

Vieno. Kion pensas la neŭtrala Aŭstrio pri "malstreĉiĝo"? Por respondi al tiu demando ni redonas la semajnan komenton de ORF verkita de ĉ-ro Alfred Macher:

"Trionon de sia longa parolado en la kongreso de la Socialista Partio, ties estro, kanceliero d-ro Bruno Kreisky - viro, kies opinio estas ankaŭ mondpolitike ŝatata - dediĉis al ĝuste tiu mondpolitiko, ĉar de la hodiaŭa mondpolitika evoluo dependos, laŭ li, verŝajne la tuta cetera evoluo dum la resto de ĉi tiu jarcento.

En la demokratioj superregas pesimismo, interalie ankaŭ pro tio, ke en Ameriko oni evitas nun pli kaj la vorton "malstreĉiĝo". Sed kial? En Eŭropo, ĉiukaze, ne minacas militdanĝeroj, sendube ĉar la militara egalpezo de la Superpotencoj ebligis tian malstreĉan politikon.

Certe, estus pli agrable, pli bele, se la malstreĉiĝo estus sekvo de pure homa sento. Sed ĉar tia aŭ iu alia alternativo ne ekzistas, Aŭstrio persiste subtenos la malstreĉiĝan politikon ankaŭ en ties nuna, kvankam malpli ideala formo.

Ni, kiuj vivas ekster la sfero de la komunista potenco, ja scias, ke ni povos pluevolui nur se la stato de malstreĉiteco pludaŭros.

Eble la A m e r i k a n o j konceptis iluziojn, aŭdante la vorton "malstreĉiĝo". Por ni E ŭ r o p a n o j, kontraŭe, ĝi signifas ion relativan.

Sed ĝuste jam pro tiu ĝia relativeco ni firmtenos ĝin celkonscie."

Dum la pasinta semajno la Esperanto-Redakcio de Vieno ricevis 20 alskribojn el 7 landoj (Anglio, Aŭstrio, Finnlando, FR Germanio, Hungario, Italio, Nederlando).

## Radio Bervalio respondas

Demando: Cu povas okazi kosma katastrofo?

Respondo: Teorie jes, sed ne temas pri katastrofo en la kosmo, sed en la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. Kaj ankaŭ tie katastrofo ne estos verŝajna - pro la konata inerteco de esperantistoj.

\*\*\*\*\*

Radio Varsovio. Elstara politika temo estis ĉi-foje sendube la ratiĝo de la pola-germana interkonsento de Helsinki fare de Bundesrat kaj la antaŭaj diskutoj kaj disputoj en la germana publiko. Ke fine Bundesrat ĉiu-voĉe ratifis la interkonsenton certe ankaŭ surprizis la Esperanto-redakcion. Por Pilo-Press tiu ĝojiga rezulto estu okazo esprimi la deziron kaj esperon, ke nun vere la vojo estas libera por normaligo konkordigo kaj repaciĝo inter la pola kaj germana popolo.

El la leterkesto de la 18-a de marto ni eksciis, ke dum la semajno de la 11-a ĝis la 17-a de marto en la Esperanto-Redakcio alvenis 97 korespondadoj. Dum kelkaj semajnoj la pintan rekordon en la statistiko tenas ges-roj Trude kaj Paul Thomas el Auerbach/GDR.

La leterkesto levis kelkajn gravajn demandojn, sed ŝajnas ke okazis ankaŭ miskompreno flanke de la redakcio. Certe, neniu kontestas la neceson, ke unuopaj aŭskultantoj skribu ĉiusemajne multajn leterojn, kaj sendube Olavi Kaleva el Finnlando havas la meriton, ke 25 aŭskultantoj skribis pasintjare pli ol 2 500 korespondadojn.